# EKO 2024

TRA LA MONDO IRAS FORTA VOKO

**Numero 2024:02, januaro 10.** Pezo: Word 40, PDF 340 KB, sume 380 KB





Fonto: *Fenikso,* la revuo de la Nederlanda movado. Ĝi aperis en la numero 2024/1.

## Plankunsido okazigota de aktiva ĉina Eo-Klubo

La 14-an de januaro 2024, Liaoning Esperanto-kultura Klubo okazigos ‘Novepokan Esperantan kunsidon 2024’, en la urbo Shenyang, Ĉinio, kune kun invititaj reprezentantoj el neesperantaj rondoj, ekz. pri ekonomio, kulturo, eduko, sciencteknik o, arto, amaskomunikiloj ktp. Dum la kunsido la klubo vaste aŭdos kaj kolektos opiniojn kaj proponojn pri la laboro de la klubo en 2024. Unuafoje por la klubo organizosi tian kunsidon depost sia fondo en 2020.




Wu Guojiang, kluba prezidanto

## La revuo Juna Amiko kaj IPR survojas al Afriko

Oni ricevos po dek kilogramoj da revuoj *Internacia Pedagogia Revuo* kaj JA. Temas pri DR Kongo, (orienta parto), Burundo, Kenjo, Tanzanio kaj Senegalo. La iniciato estas financita de la Asocio ‘Scio Sen Bariloj’. La numeroj de JA estas tiuj de 2020 kaj 2021, do freŝaj.

Mirejo Grosjean kaj Stano Marĉek.

## ILEI ĝisdatigis sian paĝon pri la Universitata Agado

ILEI interesiĝas pri agado por Esperanto en universitatoj de multaj jaroj kaj delonge havas Sciencan Komitaton, konsistantan el konataj esperantistoj plejparte laborantaj en universitatoj. En oktobro 2018 ekfunkciis labor-grupo por kunordigi kaj akceli la instruadon de Esperanto kaj de interlingvistiko en Universitatoj.

La grupo funkcias praktike en ILEI sed volonte akceptas membrojn el UEA, TEJO kaj ESF. La grupo funkcias retpoŝte, kunsidas per *Zoom* unu fojon ĉiumonate kaj komunikas siajn planojn kaj rezultojn al ĉiuj interesiĝantaj individuoj kaj organizaĵoj. Ĝi funkciigas la paĝaron: *Esperanto en Universitato*j en la vikio de UEA: https://uea.org/vikio/Kategorio:Esperanto_en_universitatoj

Nia celo estas plimultigi la kursojn pri Esperanto kaj interlingvistiko en universitatoj [Iom pri ĝia historo legeblas ĉi tie] kaj kunlaborigi la instruantojn en tiu nivelo. Tio signifas ankaŭ stimuli la esploradon en la kampo de interlingvistiko kaj esper-antologio. La ekzisto de kurso kaj esplorprojekto pri Esperanto en Universitato de unuopa lando helpas la ILEI-sekcion en la lando ricevi permesojn instrui Esperanton en lernejoj en aliaj niveloj.

Se vi scias pri kurso dei Esperanto en universitato aŭ pri instruanto en universitato, kiu estas esperantisto, bonvolu informi Ahmad Mamduhi, mamduhi<ĉe>gmail.com, aŭ Renato Corsetti, renato<ĉe>esperanto.org.

## Pri libroserva propono en Facila Esperanto

https://uea.facila.org/artikoloj/libroservo/lerni-e-legante-r399/

## AMO 106 fine de 2023 en Togolando



La ĉeftemo estas 'Esperanto kaj Mono' kaj raporto pri ĝi aperis en EKO-komuniko fine de 2023. Jen grupfoto de la partoprenintoj.

## Aruŝa altiras pli ol tricent aliĝojn

En la 9-a de januaro aliĝoj por Aruŝa kreskis ĝis 317 personoj el 48 landoj: Germanio 36, Francio 28, Italio 21, Koreio 19 Ĉinio 21, Tanzanio 15, Usono 15 kaj Brazilo 14.

## MES vokas vin al marborda paradizo

La Mediteranea Esperanto-Semajno 2024 estas preskaŭ kompleta! Restas nur kelkaj ebloj partopreni en ĝi. Ĝi okazos **de la 9-a ĝis la 16-a de marto 2024**, same kiel lastajn jarojn en la hotelo Miléade en **Les Issambres**, apud la Mediteranea marbordo en Suda Francio. La semajno inkludos **Esperantajn kursojn**, je tri niveloj, kaj kompletan distran programon kaj ekskursojn por profiti la belan veteron de la Lazura Marbordo komence de la printempo.

**Kursoj estos gvidataj de elstaraj instruistoj**:

- nivelo 1 (komencparolantoj): Rodica TODOR (Rumanio)
- nivelo 2 (progresantoj): Szilva SZABOLCS (Pollando)
- nivelo 3 (fluparolantoj): Mireille GROSJEAN (Svisio)

Pli da detaloj aperas sur la retejo de Esperanto-Provence aŭ vi povas sendi al ni retmesaĝajn demandojn.

**Filmeto prezentas la eventon. Spektu ĝin!**

https://www.helloasso.com/associations/esperanto-provence/evenements/mediteranea-esperanto-semajno

## Novjara donaco: la januara numero de Esperanto

UEA kore invitas ĉiujn esperantistojn libere elŝuti kaj legi la unuan numeron de la revuo *Esperanto* el la jarkolekto 2024.

## Pli da aziaj lernantoj bonvenaj!

La sepa azia kurso celanta la nivelon B2 komenciĝos la 24-an de januaro 2024 je la 12:30 per la zoom-konto de ILEI. Jam aliĝis multaj ĉinoj kaj koreoj sed mankas japanoj, mongoloj, vjetnamoj, indonezianoj ktp. Estas klare, ke ju pli azie internacia estos la grupo des pli interesa la kurso iĝos pro komparo inter Esperanto kaj la lingvoj de la lernantoj. Bonvolu helpi trovi lernantojn. Aliĝo senpaga akireblas per mesaĝo al kursaro.sekelj@gmx.com.

## Aktivaĵoj de AVE dum 2024

Nia ekologia faka asocio AVE partoprenos per inform-tablo en februaro la Eŭropan Kongreson de la Verdaj Partioj en Liono, Francio kaj en majo ĉe la Eŭropa Esperanto-Kongreso en Strasburgo. AVE esperebIe trovos reprezentanton por la UK en Aruŝa. AVE ankoraŭ subtenas tri projekt-grupojn en Afriko:

## Interlingvistoj servataj jam en la nova jaro

La unua numero de IpI por 2024 (n-ro 126) estas elŝutebla el la retejo de CED: https://interlingvistiko.net/interlingvistiko/.

La anglalingva versio de IpI, *Information for Interlinguists*, estas nun havebla ĝis n-ro 125, ĉi tie: https://interlingvistiko.net/en/interlinguistics/.

Tiun anglalingvan version ĝis nun eldonis ESF, sed nun CED transprenis ĝin, kaj la arkivo de pasintaj numeroj estos movita al la CED-retejo. Kontribuoj al IpI estas sendeblaj iam ajn al ipi@interlingvistiko.net. La limdato por kontribuoj al la venonta numero estas la 31-a de marto.

Mark Fettes, Direktoro, Centro de Esploro kaj Dokumentado, Universala Esperanto-Asocio

## El la universitata laborgrupo

Mi vidis alvokon al kongreso pri lingvaj ideologioj organizota en Palma en oktobro. Inter la proponitaj kongrestemoj troviĝas lingvoplanado, lingvopolitiko kaj sociolingvistiko. Tio povus interesi kelkajn inter ni. Jen la ligo: https://gresib.uib.cat/2023/12/11/3977/

Başak Aray. Turkio.

========= vortoj: 850 =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj

Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj el 2023 estas legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>